

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONA-HISPANUJO

A VIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Datreveno. — En nova jaro... — Aforismaro. — Spritaĵoj. — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Elĉerpitaj sciigoj. — Enlanda Movado. — Eksterlanda Movado. — Bibliografio. — Oficiala Parto.

La Estraro de «K. E. F.» kaj la Redakcio de «Kataluna Esperantisto», deziras al ĉiuj gelegantoj plej feliĉan kaj prosperan novan jaron

DATREVENO

LA 15^{an} Decembron 1859^a, Dro. Zamenhof, la Majstro venis en la mondon, ĉe Bjelostok (Rusa Polujo). En la datreveno de lia naskiĝotago ni esperantistoj devas ĝoji, pro tio, ke tiu eminenta homo kiu dediĉis sian tutan vivon al fratigo de la homaro, estas ankoraŭ vivanta. Ne multaj homoj, ne ĉiuj humanistoj, ne ĉiuj homoj sindonantaj al homaro por lin perfektigi, plibonigi kaj liberigi, konstatas en vivo la frukton de iliaj penadoj kaj memoferoj; tion povas konstati nia Majstro, kaj li meze de tiu mondo kiu en ĉiuj epokoj

sciis premii la profetojn kaj predikantojn per krucumo, radias kiel la Vero mem, kiel la Amo mem.

Lia traizado en la mondon faris bonon; li ja plenumis sian taskon kiel homo. Ni homoj kiel li, sciu lin imiti, kaj ĉefe lin kunhelpi per tuta nia abnegacio. La estontuloj nin benos kiel ni estantuloj benas la Majstron. Sed ni meritu la benon!

Longedaŭran vivon al Dro. Zamenhof!

K. E.



EN NOVA JARO...

KATALUNA proverbo diras: «En jaro nova, vivo nova». Jen proverbo kiu enhavas senton tute esperoplena, kiu estas optimisma, kiu sentigas en ni, fortan inklinon antaŭeniri en perfektigo, en fortikeco, en memvoleco.

Kiam en nova jaro ni al ni ripetas ĉi tiun proverbon, ŝajnas al ni ke ĝi taŭgas kvazaŭ alparolo de militestro al armeoj antaŭ la ekkomenco de batalo. Kaj ĝi enŝovigas en nin la tutan necesan kuraĝon kaj decidon por reentrepreni nian antaŭsignitan vojon en la vivado. Ni ĉiujare, en la komenco de la jaro, promesas al ni plenumi novajn taskojn pri novaj aspektoj kaj flankoj de la vivo. Kaj la proponoj de ni difinitaj estas efektivigitaj dum la jaro, danko al akiro de novaj entuziasmoj, agemeco kaj kuraĝo kiujn al ni liveras la antaŭ citita proverbo.

* * *

«En jaro nova, vivo nova», estas nia persona devizo, ĉe ĉiu komenco de jaro. Ke en ĉi tiu jaro, ĉe la atingo de la dua jaro de K. E. F. ni juĝis ke la proverbo ankaŭ povus taŭgi por ni katalunaj esperantistoj, rilate al nia organizado. Se ni ĉiuj sen escepte, sciis plenumi la decidon kiun ĝi enhavas; se ni katalunoj sciis akiri la necesan entuziasmon kaj decidon liveri al nia societo plej prosperan vivon, plej efikan povon, ni estu certaj ke en la fino de la nuna jaro ni estos tre malproksime sur nia vojo.

Tute ne taŭgas ke ĉiu redakciano aŭ estrarano persone prenu sur sin tian devizon rilate al nia Federacio. Kio plene taŭgas al unu sola homo, tio plej ofte ne efikas al multaj homoj se ĉiuj ne estas persone

tion preninte sur sin. Spite nia deziro, spite nia decido kaj memvoleco kaj entrepreno nek nian Federacion, ni apartaj homoj prosperigos, nek nian K. E. ni riĉigos nek igos plene interesan. Certe ni per nia memvaloro kaj agemeco povos atingi pli malpli altan rangon en la esperanta asocio kaj en la esperantaj gazetoj, sed ne tiel ĉefan kiel ni atingos por la ĉies konstanta kaj multenombra kunhelpado, ĉar estas per la adicio de multaj unuoj ke la nombroj valoras kaj riĉiĝas.

Ni aparte, en la plenumo de nia devo kiel redakcianoj celis efektiviĝi la de ni mem antaŭe prezentitajn proponojn, sed kvankam ni ne restis solaj, ni ne estis sufiĉaj por ĉion entrepreni kaj realigi. Vi ne kredu, tamen, ke ni ne atingis la plej ĉefan parton de niaj proponoj, sed ni estas malkvietemaj, ni estas perfektigemaj, progresemaj kaj ne plaĉas al ni sidi sur la vojo, pro tio ke la vojoj estas por marŝi sur ĝi, kaj ju pli ni antaŭeniras des pli ni vivos kun novaj pli multvaloraj fortoj kaj ecoj.

Ni estas ja kontentaj de nia kuna laboro, sed ni juĝas ke tiu sama farita laboro postulas de ni, de ĉiuj, novajn plej riĉigajn aferojn. Ni devas ĉiame celi perfektigon en niaj agadoj kaj faroj pro tio ke ni estas homoj. Ni perfektigu ankaŭ nian esperantan agadon.

Por tio atingi estas du peroj. Iuj povas la perfektigon kunhelpi per mono kaj verkoj : aliaj per mono. Ĉiu donu kion li povas, sed ĉiu donu, ĉiuj estu sindonemaj, memoferaj, pro tio ke pro la ĉies memoferoj ni prosperos.

* * *

Antaŭ unu jaro, kiam ni naskiĝis, ni certe ne sciis ĉu ni vivos aŭ mortos tuje. Tiam estis vintro en la kataluna esperantista kampo; sed ni flamiĝemaj, agis kiel la mikdalarboj; ni floris spite la vintra sezono, la malvarmo kaj la minacanta frosto. Ni kuraĝe floris kaj plej kuraĝe ni fruktis, ĉar nian floron ne mortigis la vintro, sed ĝi deŝiriĝis tute nature antaŭ frukti por vidigi kaj montriĝi al skeptikuloj la vojon sur kiu ili iros kaj sur kiu ni estis irantaj tute sindonaj kiel la floroj mem.

Sur nia vojo ni kolektiĝis pli ol tricent; ni pli kolektiĝos en tiu ĉi jaro, ĝis ne restos unu sola for de nia kampo. Kaj ni ankaŭ fruktos!

* * *

Sed ni devigu al ni alvarbi novajn geanojn, novajn kunlaborantojn, ĝis neniu mankos en nia rondo. Ni fervore tion devas celi, pro

tio, ke K. E. F. fariĝis la riprezentanto de Esperantismo en Katalunlando. Male al la opinio de kelkaj sinjoroj kiuj pretendas ke nia Federacio estas plia societo, ajna societo, kvazaŭ loka grupo, ni devas aserti ke ĝi estas nek aparta, nek persona, nek izola. Ĉirkaŭ ĝi ne estas muro ĝin apartigante de la mondo, nek de la fremdaj aŭ amikaj rigardoj, kiel volas esprimi tiuj sinjoroj per ilia diraĵo. Nia pordo estas de post ĉiam malfermita al kvar flankoj kaj al ĉiuj homoj. Sur ĝi estas nenia avizo malpermesante la eniron. Ĉu okaze, nur estos sur ĝi la antaŭjuĝoj kiujn ili mem surskribis ĉu pense ĉu intence, tiuj sinjoroj. Ni celis fari nian domon komfortan taŭgan por ĉiuj. Plej bone ol niaj vortoj tion montrigas niaj faroj. Se ni en tute ne sukcesis, venu al ni la pli ol ni lertaj, agemaj, memvolaj, amemaj kamaradoj; venu al ni se ili estas tiele, kaj ni ĝoje ilin akceptos kaj ĉirkaŭbrakos. Ĉio por Esperanto!

* * *

Rilate al nia gazeto, ni volus ke ĝi estu luksa, bela, valora, interesa, alloga kiel eble. Ni volus ke ĝi estu reflekso de la memvaloro kaj inteligenteco de nia samideanaro en ĉiuj rilatoj koncernantaj al Arto kaj Beletristiko, kaj ĉefe al Esperanto, por ke la neesperantistoj konvinkiĝu ke ni ne estas ajna amaso, al kiu mankas la sento pri la Belo kaj Estetiko, Sed, kiel ni antaŭe diris ne nur ni solaj ĉion povas efektiviĝi. Ĉiuj nin kunhelpu, kaj la cetero venos per siaj propraj paŝoj.

Kaj tiel en atingo de nova jaro, ni plej fervore ripetos «En jaro nova, vivo nova», ĉu?

★ ★ ★

AFORISMARO

Katalune verkis, *F. de P. Bedós*

ĈIUJ birdoj ne estas egalaj : unuj *sidas sur tero* altiras siajn flugilojn por manĝi kaj nur ree suprenflugas post satiĝo; la aglo iras *sur la ebenaĵon*, flugilsvingante unĝokaptas kaj ree altenflugas : eĉ manĝante ĝi *ne forlasas la altecojn*.

— La amasoestroj en la momento de la agado antaŭeniras sen priokupiĝi pri la nombro kaj ecoj de la sekvantaro : la homoenkon-

dukantoj antaŭmetas la amason, kaj en la atingo de la celo, per vipbatoj forigas la ŝafidojn por *malfermi la pordon*.

— Inter la bonuloj, la homo malbona estas malsanulo : inter la malbonuloj, la homo bona estas senutilulo.

— La priokupo pri la peroj multan fojon perdigas la *konscion de la celo*. Zorgu sciigi ke *ekzistas unu celo*, kaj ĉiam klopodu por la *sama celo*.

— Atentu mia amiko ; ne fidi al la ceteraj povas esti elmonro de la malmulto kiun oni povas fidi al si mem.

— Vi ne vin elliveru al celo kiun vi celas, ĝis kiam vi estos rigardinte ĝin en la *lumo de la tago* ; la lumo de la sento estas lumo de luno, kiu poetigas eĉ la malvivaĵojn.

— Mi vere vin diras, ke, kiam vi disdonos la ĝuadojn vi *havos* geamikojn, kaj la suferojn disdonante vi *konstatos* la geamikojn.

— Multaj homoj akceptas la konsolesprimojn por havi motivojn eligi la konsolon kiun ili interne entenis.

— La vivo estas ŝtuparo tra kiu la homoj devas fatale suriri, kaj pro iliaj agoj iuj suriras tre rapide, aliaj malrapide, kaj aliaj malsupren falas. Sed kion mi ja diras estas, ke, neniu rajtas sidiĝi sur la ŝtupoj.

— La grandaj jesoĵ de la homaro determinantaj la progresadon de la popoloj, estis faritaj pro tri demandoj : — kiel ? — kiam ? — kial ?

— La religioj metas ilian celon *super* ni ; la scienco *antaŭe*... Nuntempe ni marŝas...

— Estas ideoj kiuj ne estas grandaj en la momento de la naskiĝo : ilin grandigas kaj fortigas la kuniĝado de pensmanieroj, same kiel la riveroj kiuj fariĝas multakvoportaj per la multaj alfluantoj ilin nutrantaj.

— La torentodebordiĝoj *ĉiam malutilas* ; la superakviĝo de la

riveroj vastaj kaj largobordaj, kiel la Nilo, *ĉiam utilas*. Le politikaj agitistoj estas la torentoj; la patricioj grandaj, kiuj predikas la humanajn idealojn, estas la Niloj de la popoloj.

— Vi ne lasu vin surprizi. Se en via travivado vi renkontas *grandhomon*, antaŭ lin respektigi vidu ĉu li *staras* sur la tero.

— Tiu ĉi devas esti via unua penso je la vekigo: *fari bonagon*. Tiu ĉi devas esti via unua faro: *praktiki bonagon*. Viaj faroj kaj pensoj postaj: *ripetadi kiel plej ofte eble vian unuan penson kaj vian anuan faron*.

— Ĉu vi volus antaŭeniri kaj la malhelpaĵoj vin haltigas? Vi ne *rajtas* antaŭeniri.

— Kiam mi renkontas mallongigantan vojon mi pensas: *jen vojo ekkomencita de volulo*.

— Ni estu kiel la apudvoĵaj arboj: la brakoj ĉiam kompateme etenditaj; senfoliĝintaj en vintro por lasi libere trairi la radiojn de la bonfaranta suno; sin kovrinte per verda foliaro en somero, por liveri fortikigantan ombron al bedaŭrindaj gevojirantoj.

— Kiam oni petos al vi, kiu vi estas? klopodu *povi* respondi: *mi estas rekta linio kiu iras celon*.

— Se vi volas alteniri, la envidemuloj vin perforte tenos por tion malebligi; se vi triumfas, ili vin puŝos por pli altenirigi vin, dirante ke, estas ili kiuj vin altenirigis, sed kaŝe por vidi ĉu vi kapturniĝas kaj falas.

— Vi estu plimultiganto de via propra unueco; ĉar mi vere vin diras, ke, estas multaj homoj, kiuj *valoron* ne havas per si mem, sed per la nuloj ilin sekvantaj.

— La historiistoj de alcentrigantaj ŝtatoj skribante siajn verkojn agas kiel Apeles kiam li portretis la reĝon Antigon'on; li lin profil-portretis, por ke oni ne vidos ke li estis unuokula. La tuta historio kiun oni instruas en Universitatoj, estas profilfarita.

— Supren, supren, se vi soifas! Vi trovos malpli da fontanoj sed la fluoj estas pli puraj.

— Li estas granda filozofa? Mi ĝin ne dubas, sed hieraŭ li blovis glaciaĵon pro timo sin vundbruligi.

— Vi juĝas vin *bona* tial ke vi *sentas ĝojon* kiam vi renkontas mizerulon al kiu almozdoni? Mi plu ŝatos *malbonulon*, kiu pro malamo al mizeruloj riĉigos ĉiujn.

— Vi ne sciafektu neniam pro la povo de viaj prapatroj, ĉar tiu ĉi sciafekto nur taŭgus por elmontri vian propran senfortecon.

Esperantigis,

D. SERDÁ



SPRITAĴOJ

Ju vojaĝiranto renkontis hindon meze de dezerto. Ambaŭ rajdiras sur sia ĉevalo. La vojaĝiranto, kiu rimarkis ke lia ĉevalo ne plu povis lin surporti kaj ke tiu de la hindo estis potenca, petegis de li la ĉevalon por povi tiamaniere daŭrigi la marŝadon; la hindo, kompreneble, tute malcedis tian ŝanĝon, ĉar nenion gajnis sed kontraŭe malgajnis, kaj ili finis per varmiĝa disputo; sed, ĉar la vojaĝiranto estis armita, la hindo perforte cedis kaj sin lasis rabi sian belan ĉevalon. La hindo renkontebaris sian ŝtelinton kaj tuj, kiam alvenis en la urbo prezentis sin tuje al la juĝisto denunci tiun, kiu tiele al li rabis la ĉevalon. La vojaĝiranto estis devigita alveni antaŭ la juĝisto kaj tie li subtenis kontraŭ la kulpiginto, ke la ĉevalo apartenas al li kaj ke ĝi estis nutrita de li de antaŭ siaj unuaj jaroj. Ne estis tie alestintoj de la fakto, nek ia pruvo kontraŭ tio, kion ĉiu certigas, kaj ŝanceliĝanta la juĝisto volis forlasi tiun aferon, kiun nesciis kiele decidi, kiam la hindo ekkriis; la ĉevalo apartenas al mi kaj mi havas pruvojn pri tio.

Li elpoŝis naztukon kaj kovris subite la kapon de la besto, kaj sin turnante al la juĝisto diris: «ĉar tiu ĉi homo certigas ke tiu ĉi ĉevalo apartenas al li, ke li diru, kiun okulon ĝi havas blinda» .

La vojaĝiranto sentime ekrespondis: «mi tre bone scias tion; ja ĝi havas blinda naskiĝe la dekstran okulon» .

Tiam la hindo elmontrante la kapon de la ĉevalo, rediris: «nu,

ja mi vin kaptis; nek ĝi havas blinda la dekstran okulon nek la maldekstran».

La juĝisto, plene konvinkita per pruvo tiel sprita, kiel taŭga, li veris al li la ĉevalon, restante la vojaĝiranto plene surprizita.

Esperantigis,

JOZEFO PI

PATRO KAJ FILO

— Komediisto!... kantanto!... Tion vi deziras profesie fari?

— Ho jes, jam de longe mi tion revas.

— Do, mi ne permesas al vi tion fari, ĉar mi ne deziras ke vi malhonoru mian nomon sur la scenejoj.

— Pro tio ne timu, ĉar kiel aktoro mi uzados pseŭdonimon.

— Nu, kaj tiam se vi sukcesas kaj fariĝas fama aktoro, neniu scios ke mi estas via pätro.

MALFELIĈULO

Sinjoro riĉega, sed pli malbela ol riĉa, demandas al bela fraŭlino.

— Ĉu vi bonvolus esti mia edzino?

— Mi pli dezirus esti via vidvino, — sincere respondis ŝi.

EN BARBIREJO

La kliento : — Ŝajnas al mi ke vi raziltranĉis min.

La razisto : — Ne ankoraŭ, sinjoro.

IRI POR LANO

Alveninte kamparano en Madridon en festa epoko dediĉis sian tempon vizitante butikojn kaj vendejojn, por sin amuzi. Enirinte en bankoficejon kaj vidinte nenion vendeblan, demandis junulon kiu staris post la kontoro. — Ĉu vi bonvolus diri al mi kion oni vendas ĉi tie? — Azenajn kapojn, — diris tiu dezirante moki la kamparanon. — Nu: kredeble vi vendadis multajn ĉar nun restas nur unu vendeblan.

* * *

Malriĉulo estis sidanta sur sojla preĝejo. Pasas antaŭ li sinjorino, haltas kaj serĉadas en siaj poŝojn; fine diras :

Senkulpigu min, bona viro, mi kredis esti kunportante centimojn kaj nur mi trovis durojn en miajn poŝojn.

La malriĉulo ne koleriĝinte — Estas same sinjorino, mi estas preskaŭ blindulo.

INFANAĴO

Kvar aŭ kvin infanoj post ludado decidis iri sablaron por padeli kaj eĉ por sin bani, sed sciigante pri tio nenion al siaj gepatroj.

Inter ili estis iu nomata Peĉjo kiu fanfaronante, eniris en maron. Tamen, apenaŭ sublasis la sablon, ektimis, vokis kaj glitiĝis maren, kaj kvazaŭ englutita de la maro li malaperis.

Neniu el la aliaj kuraĝis lin eltiri. Fine alvenis fiŝkaptisto kaj ĵetinte sin maren prosperis kapti Peĉjon tute senmovan. La fiŝkaptisto elirigis la tutan akvon de li englutitan kaj tiam li ekmontris iom da vivo.

Post kelkaj minutoj li estis kiel antaŭe kaj ekĝemis malĝoje : — Se mi estus droninta... kia batado mia patrino ?

* * *

Du viroj renkontiĝas sur sama vojo. Unu demandas la alian :

Bonvolu diri, kiom da tempo mankas al mi por atingi la vilaĝon X ?

— Marŝu, respondas la alia.

— Diru al mi kiom mankas ?

— Marŝu, li ripetas. — Mi vojaĝadis multe kaj neniam mi renkontis malafablan viron kiel vi, — kaj dirinte tion kolere marŝas pli rapide. — Per tiu ĉi marŝado, — diras la demandito, — post duono da horo vi alvenos tie.

* * *

Promenejo trairas aŭtomobilo kuregante. Samtempe trapiediras sprita infaneto kun sia patro kaj vidinte ĝin ekkrias. — Rigardu, paĉjo veturilon kies ĉevaloj forkuris, kaj ĝi nun kuregas por ilin atingi.

T. P.

★ ★ ★

STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sekvo)¹

POVU

Sab. — Estas neniu, kiu povu suferi tion! (74)

Orig. — *Això no hi ha qui ho aguant!*

Rap. — Tion, neniu povus elporti aŭ surporti (aŭ : tio ĉi ja ne estas surportebla!)

PRENU anstataŭ JEN. (Kataluna, *tenir* = havi, preni, teni, jen, nu!)

Sab. — Prenu! Rigardu tuin ĉi dezegnaĵon. (10)

Orig. — *Teniu! Mireu aquest dibuix!*

Rap. — Jen! Rigardu tiu ĉi dezegnaĵon!

PROPA (eble PROPRA) kun la senco PERSONA KARAKTERIZA DE IU...

Sab. — ... sed ke vi faras pentraĵojn... tiel... propajn, tiel personajn, tiel malsamajn de ĉiuj aliaj... (68)

Orig. — ... *però que fas una pintura... tant... teva, tant personal, tant diferenta de la de tothom.*

Rap. — ... sed ke vi havas pentromanieron... tiel... vian, tiel personan, tiel malsaman de tiu de ĉiuj aliaj... (Laŭvorte kaj laŭsence.)

PROPE (eble PROPRE) kun la senco TIEL, *tiel, ĝuste*

Seb. — beleco propre nomita : kaj kiel li sekvis la prope kiun mi enradikigis al li. (12)

Orig. — « *belleza propiamente dicha* » (la frazo estas en hispana lingvo) *I com que ha seguit la «propiamente» que jo li vaig inculcar... (propiamente ankaŭ estas hispana adverbo, uzita kiel substantivo, en la originalo).*

Rap. — beleco tiel, (ĝuste aŭ simple) nomita kaj ĉar li sekvis (eble, pli bone : elektis, aŭ adeptiĝis al) tiun ĉi lastan (aŭ : la simplan aŭ puran) kiun mi enradikis en lin... (Rimarko pri : «kiel li sekvis»)

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap. Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a, 5^a, 6^a, 7^a, 8^a kaj 9^a.)

REBRILI

Sab. — kaj tiel rebrilis, liaj vestaĵoj. = ... se la vestaĵoj ne rebrilis al mi. (115)

Orig. — *i li lluia tant la roba,.. = Si a mi no m'ha lluit la roba...*

Rap. — kaj liaj vestaĵoj estis tiel riĉaj, (aŭ elegantaj) = ... se miaj vestaĵoj ne estis riĉaj (aŭ elegantaj, bongustaj).

RILATI, kun la senco ALUDI, PAROLI aŭ io simila (eble ĉar katalune *relacio* signifas raporto'n, rakonto'n, krom rilato)

Sab. — Mi jam scias pri kio ci rilatas. (14)

Orig. — *Això, ja se lo que vols dir!* (Estas manko de sintakso)

Rap. — Mi scias, kion vi volas diri per tio.

Sab. — La vivo, kiun oni devas fari, laŭ mi aŭdis rilati, kiam oni sekvas tiun ĉi metion,.. (21)

Orig. — *la vida, qu'he sentit dir qu'han de dur els qu'emprenen aquest ofici...*

Rap. — ... la vivo, kiun laŭ tio kion mi aŭdis, devas fari tiuj, kiuj entreprenas (alprenas) tiun ĉi metion.

Sab. — La aŭtoro rilatas la malriĉajn vidvinojn, kiuj ne povas... (54)
(Noto de la tradukinto por klarigi ke la aŭtoro parolas pri, aŭ aludas...).

(*Daŭrigos.*)



ELĈERPITAJ SCIIGOJ

Post balotado de la Lingvaj Komitatanoj estis elektitaj anoj de la «Akademio» Sroj. Lengyel kaj Inglada.

«Kataluna Studkomisio». — La anoj de tiu ĉi komisio estas: Sroj. Pujulà i Vallés, Codorniu, Serdà, Torent kaj Bremón i Masgrau.

La artikolo «Originalaj temoj» kiun ni publikigis en nia n^o 6^a 7^a subskribita de nia kora amiko S. Pubill, Skolpiulo, estis transkribita de *Le Monde Espérantiste*.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Propaganda esperantista ekspozicio. — Tiu ĉi ekspozicio, organizita de la grupo «Ĉiam antaŭen» estis vere vizitinda. En ĝi ni vidis esperantajn revuojn — kelkaj el ili tute nekonitaj ĉe ni — poŝtkartojn, firmajn katalogojn, foto-grafajojn, dokumentojn de la Internaciaj Kongresoj, gvidlibrojn de la ĉefaj urboj, originalajn kaj tradukitajn verkojn k. t. p.; bela portreto de Dro. Zamenhof kaj granda verda stelo sub la plafono prezidis tian amason da esperantaĵoj.

Dum la daŭro de la ekspozicio oni organizis la jenajn festojn :

Koncerto. — La 4^{am} de Decembro okazis bela koncerto en kiu partoprenis la «Orfeo Canigó» kiun direktas Sro. J. B. Espadaler kun la helpo de Finoj. Maria Davalillo kaj Adela Cots kaj Sroj. Agustí Pereña kaj Josep Martorell. Krom aliaj kantoj, estis kantataj esperante la melodiojn *Mi rakontis*, *Mi amis vin* kaj nian himnon *La Espero'n*.

Sro. J. Albiñana ludis tre bone la monologon *Okaza Artisto'n* de Sro. F. Pujulà i Vallés.

Ĉiuj la partoprenintoj ricevis aplaŭdadojn de la multenombra ĉeestantaro.

Teatra festo. — La festo komenciĝis per *Aida* ludita de la muzikistaro «L'Harmónica». Geanoj de la «Ateneo Obrero Martinense», societo kie okazis tiu festo, ludis *Juventut*, ricevinte justajn aplaŭdojn pro ilia laŭdinda ludmaniero.

Vivu Esperanto duakta komedio de Sro. M. Cases, estis ludita de la teatra fako de «Universala Frateco». La laboro de Finoj. Grau, Puig kaj Fontanellas kaj Sroj. Grau, Fernández, Nicolau kaj Puig juste sukcesis.

Per bela voĉo Sro. Batlle kantis diversajn kantojn kaj poste oni kantis unuafoje la himnon *Ĉiam Antaŭen!* kiun ni publikigis en la lasta numero de «K. E.». Tiu ĉi himno estis kantata de la geanaro de «Ĉ. A.» kiuj ricevis bruegan aplaŭdodon, pro kio ili estis devigataj ĝin rekanti.

Per «La Espero» kaj fortaj kriegoj vivu Esperanto! kaj vivu Zamenhof! la festo bele finiĝis.

Balo. — Nokte, la saman tagon, la «Ateneo Obrero Martinense» organizis balon kiun ĝi dediĉis al la esperantistaj grupoj kaj societoj. Dum ĝi oni dancis «La Rondo'n».

Festeno. — Tiu grava ekspozicio estis malfermata per festeno, okazinta la 18^{am} de Decembro, en kiu partoprenis la gesamgrupanoj kaj gelernantoj de la diversaj kursoj kiujn klarigas «Ĉiam Antaŭen».

Niajn gratulojn ol la organizintoj.

— Pro klopodoj de Sroj. J. Astell, D. Dalmau kaj E. Rey, la Direktanto de «Los Tranvías de Barcelona», Sro. Foronda, donis permeson por ke la tramveturilaj kondukistoj kaj enspezistoj sciantaj nian lingvon kunportu la verdan stelon sur la brusto, same kiel ĝis nun faris por la naciaj lingvoj.

Festoj. — La festo okazinta en la grupo «Barcelona Stelo» plene sukcesis. La lernantoj de tiu ĉi grupo bone elparolas Esperanton kaj tion pruvis per la poezioj kiujn ili legis. Paroladoj pro Esperanto estis ankaŭ faritaj, ricevinte ĉiuj merititajn aplaŭdojn.

La grupo «Universala Frateco» organizis teatran feston, dum kiu oni ludis katalune *El casament per forsa*, kastile *La epidemia* kaj esperante la monologon, *La benkoj de la promenejo'n* bone ludita de Sro. Grau kaj *Edziĝo kontraŭvola* jam ludita unue katalune.

Ĉiuj ricevis laŭdigajn aplaŭdojn kaj Fino. Grau plie, belan bukedon da floroj kaj blankajn kolombojn.

La festo finiĝis per *La Espero*, kantita de la ĉeestantaro.

Novaj kursoj. — Ĉe la grupo «Esperanto kaj Patrujo», Sro. Bermúdez, komencis novan kurson senpagan. La lernantoj estas multnombraj.

Ankaŭ la grupo «Supren...!» malfermis du kursojn. La unua kurso okazas lundojn, merkredojn kaj vendredojn de la 9^a ĝis la 10^a nokte; la dua kurso, praktika, okazas mardojn, ĵaŭdojn kaj sabatojn je la sama horo; ambaŭ estas senpagaj.

La societo «Espero Kataluna» elektis novan komitaton; jen ĝi: *Prezidanto*, Joan Rosals; *Vic-prezidanto*, E. Pellicer; *Sekretario*, J. Astell; *Vic-sekretario*, E. Roig; *Kasisto*, P. Riera; *Bibliotekisto*, V. Renóm; *Voĉdonantoj*, B. Anglada, J. Llorac kaj C. Soler.

Eksposicio. — La grupo «Universala Frateco» pretigas propagandan ekspozicion, kaj ĝi petas la ĉies kunhelpo.

Ĝi konsistas el tri fakoj: «Fako de ilustritaj poŝtkartoj» «Fako de verkoj» kaj «Fako de propagandiloj».

TARRAGONA

La ĉi tiea Societo por la alilandanoj nomis niajn samideanojn Sron. Solé, kiel kasiston, kaj Sron. Molas kiel viĉdonanton. Ĝi fervore akceptis Esperanton.

La afabla samideano Rafaelo Naklé, egiptiano, veturante al Valencia', vizitis nian urbon.

Sro. Solé Granell, partoprenis kiel delegito de «Tarragono Esperanta» la inaŭguron de la Sabadell'a grupo «Katolika Stelo».

Ĉe nia grupo daŭrigas Esperantan Kurson, Sro. Vidal.

REUS

La nova estraro de Nava Semo konsistas el Sroj. Antoni Clivillés, *Prezidanto*; Pere Aguadé, *Vic-prezidanto*; Joan Simó, *Bibliotekisto*; Enric Aguadé, *Kasisto*, kaj Joan Vallés, *Sekretario*.

Ĉe la razejo de Sro. N. Ribas. Esperante oni gratulis la Kristnaskan feston.

SABADELL

La ĉi ticia societo «Centre de Dependents del Comerç i de la Industria» en lasta kunsido decidis krei «Esperanta Fako'n».

Oni elektis komisionon, kiu en la 30^a Decembro 1910^a kunvenigis la samideanoj partoformontajn tian «Esperanta Fako'n». En tia kunveno oni aprobis regularon kaj elektis la estraranojn.

La inaŭgura festo de «Katolika Stelo» okazinta en 11^a Decembro 1910^a, okazis sukcesplene. En ĝi partoprenis multaj gesamideanoj urbaj kaj aliurbaj.

Se la de «Katolika Stelo» atingotan celon ni devas aljuĝi per tiu-ĉi festo, ni povas aserti ke ĝi triumfos baldaŭe.

La eksposicio organizita de tiu ĉi nova Sabadell'a societo estis vizitata multenombre.

Ni bedaŭras ne povi recenzi la tutan feston, pro manko da loko.

Dimanĉo 8.^a de Januaro, nia estimata federaciano Sro. J. Buxó faros paroladon priesperantan, ĉe la «Academia Catolica».

MANLLEU

Niaj kursoj bone prosperas.

«Esperanta Amo» organizis ĉiudimanĉajn esperantistajn ekskursojn, en kiu partoprenas multaj geanoj. Ilia celo estas praktiki nian internacian lingvon, por kio multe helpas nia kamarado Coll Calvet.

La Manlleu'anoj deziras feliĉan novjaron al ĉiuj belegantoj de «K. E.»

TERRASSA

Okazis en nia grupo «Lumon» la 18^{an} pasintan Decembron, la unua festeto el serio kiun oni aranĝas. Ĝi estis dediĉata al nia kara majstro Dro. Zamenhof okaze de la 51^a datreveno de lia naskiĝo. Oni legis diversajn poeziojn, prozaĵojn k. a. adekvatajn al tiu festo. Fine la ĉeestantaro stare kantis *La Espero'n* kaj eliris entuziasmigita de la sukceso kiun ĝi atingis:

Estas elektita en ĝenerala kunsido, la nova komitato por la nuna jaro,

jene : *Prezidanto*, Valentí Alavedra ; *Sekretario*, Josep Ventura ; *Kasisto*, Miquel Astals ; *Arĥivisto*, Baltasar Pineda ; *Voĉdonantoj*, Adolf Soldevila, Anton Costajussá kaj Josep Arisó.



EKSTERLANDA MOVADO

BELGICA

FREDERIK DE SKEEL - GIÖRLING

Amb la mort den Skeel Giörling l'esperantisme danés ha perdut el seu més eminent adepte, insubstituible, car ell fou qui introduí l'Esperanto a Dinamarca, ara fa uns nou anys, durant els quals se pot dir que no ha fet més que vida esperantista ; la seva major preocupació ha sigut per a aquest ideal. Parlar den Skeel Giörling es gairebé 'l mateix que contar l'istoria del moviment esperantista a Dinamarca, avent merescut per això 'l nom de «pare de l'esperantisme danés». Dintre l'esperantisme ha tingut importants carregs, i no solament en el seu país. Fundador de diferents agrupaments y de la revista *Dana Esperantisto*, de la qual n'avia sigut principal redactor. En els «Floraj Ludoj» de Barcelona seia amb el jurat.

Ara darrerament redactava la *Kongresa Revuo* en l'Exposició de Bruselles... en fi, que l'Esperanto s'ha alleugerit d'un dels seus majors puntals.

Que la pau sigui amb ell!

7.^è *Congrés Internacional d'Esperanto* (20-27 d'Agost 1911). — El senyor Schmit, quefe de policia d'Anvers, ha fet saber al personal a ses ordres, l'obertura d'un curs d'Esperanto per als oficials i empleats de la policia urbana. Seran concedides dues ores de vacances als que y concorrin per a facilitar-los seguir regularment la instrucció, la qual serà organitzada dintre de poc.

— Fem una nova crida als esperantistes per a que no apleassin adherir-se al Congrés, per a el qual repetim lo que havem dit anteriorment : la greu responsabilitat moral i financiera de «La Sepo» fa necessari saber, com més prompte millor, de quines entrades pot disposar aproximadament. La organització material del Congrés indispensablement depèn dels llurs auxilis amb diner.

— Per a donar èxit al concurs literari que organitzarà «La Sepo» preguem als periodics, societats i als benevols correligionaris esperantistes que ofereixin

premis per als temes que vulguin presentar. Que's serveixin informar d'això al Secretari-Caixaer de «La Sepo» (Sro. F. W. van der Biest, 76, Minderbroedersrui, Antwerpen [Canal des Recollets], Anvers), abans del 15 de Març vinent. Es de desitjar que B. E. pugui publicar una primera llista de premis oferts amb els temes que an ells se relacionin en el nombre de Janer.—*La Sepo*.

— El nombre de congressistes ha arribat ja a 262.

— Es d'esperar que tots els nostres lectors hauran rebut amb el nombre de Desembre de K. E. una fulla-aligilo. Aquells dels nostres federats que'n desitgin de noves, poden reclamar-les per postal a la Redacció de K. E.



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Bulgaraĵ Rakontoj, de Ivan Minĉer Vazov. Tradukis At. D. Atanasov, (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo : 0'10 sm.

Estas tute rekomendinda tiu ĉi libreto. Dum la legado de ĝiaj Rakontoj ŝajnas ke elspiro de tiu lando enŝoviĝas en vin kaj vi sukcesas travivi ĉiujn okazojn en ĝi naskiĝintaj. Ĝi ja emocias. Kaj ĉu oni alion povas postuli? — *Civitano*.

Noto pri la Inicilo Matematika (patentita en kelkaj landoj.) Jacques Camescasse. — Librejo Hachette kaj K^o, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris. — Prezo : 4 franko (0'40 sm.).

Ni recenzos en venonta numero.



OFICIALA PARTO

2^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio» okazonta en Tarragona, dum la monato Junio. — En la venonta n^o ni konigos la decidon de sinjoroj F. Pujulà Vallés, Joan Rosals kaj D. Serdà, kiujn en la unua Kongreso oni elektis kiel organizintojn de la «Literaturoj Konkursoj».

En ĉiu postvenonta n^o ni konigos la kongresajn organizojn.